


Esperanto *en Danio*

16-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2009



L.L. Zamenhof - 150-jara en 2009

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Rasmus Høyrup Jensen

Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.04.2009

Enhavo

Sojle al espero.....	3
Mesaĝo de la nepo de Zamenhof.....	4
Ĝustigoj.....	5
Kopenhago.....	6
Næstved.....	7
100-jara datreveno de Ivo Lapenna....	7
Esperanto kaj Martinus.....	8
Kultura Esperanto-Festivalo.....	12
Pensoj de desegnisto.....	13
EU-Parlamenta laboro.....	15
Esperanto en Usono.....	16
Informofilmo.....	18
Somera Esperanto-Studado.....	19
UEA ĉe lingvotestistoj.....	20
Novtipa UEA-ekzameno premieris...	20
Nova elpaŝo de UEA ĉe UN.....	21
Esperantourboj.....	22
Por verkemuloj.....	23
Por instruemuloj.....	23

Sojle al espero



..estas la titolo de la novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA Probal Dasgupta. Kaj li daŭrigas:

Inter la 100-jariĝo de UEA (kaj de DEA) en 2008 kaj la 150-jara jubileo de Zamenhof en 2009, sukcesis 60-jariĝi la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Se ĝuste nun ĉe UN kaj Unesko sin sekvas Internacia Jaro de

Lingvoj 2008, Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009, Internacia Jaro de Lernado pri Homaj Rajtoj 2009 – kvazaŭ ili sciis, ke Zamenhof aktivis por la lingva justeco kaj por la paco – ĉu ni ne ĝoju, ke la astroj mistere agordas la mondon al niaj celadoj?

Pri homaj rajtoj okupiĝis precipe Ivo Lapenna, kies 100-jariĝo ni festas ĉi jare, kaj li enmetis ilin en la statuto de UEA en 1947, fakte jaron pli frue ol la internacia komunumo. Do, ni denove festos rimarkindajn datrevenojn. Kaj kiamaniere ni mem povas kontribui? La lastajn monatojn ni travivis ekscitan periodon okaze de la kampanjo en la paĝaro change.org pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn de Usono, kiu donis al nia movado rimarkindan sukceson.

Nun temas pri enkonduko de Esperanto en lernejoj de EU, kaj mi tre esperas ke ni atingos la apogon de ĉiuj danaj esperantistoj kaj de multaj aliaj, ekzemple iliaj familianoj kaj amikoj. Tiuspeca reklamo por Esperanto estas senpaga, senpena kaj el la strategia vidpunkto treege grava por ni. Do, iru al www.europaeiske-borgerkonsultationer.eu/proposal/2017, se vi ankoraŭ ne voĉdonis.

Alia grava voĉdonado okazas en la paĝaro de la slovena EU parlamentanino Ljudmila Novak, kies ligilon mi sendis rete la niaj membroj. Ŝi lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj kaj ne plu aktivis, sed de kiam ŝi ĉeestis la EEU kongreson en Maribor en 2007 ŝi denove fariĝis varma apogantino de nia lingvo. Estas laŭ mi eĉ pli grave apogi ŝian proponon, kiun ŝi sendis rekte al la EU-Parlamento, kaj nia rekono al ŝiaj klopodoj estas tre dezirinda. Do, ni ĉiuj povas fari multon por ke la ideoj de Zamenhof por lingva justeco kaj paco disvastiĝu larĝskale.

Ileana Schröder

Mesaĝo de la nepo de Zamenhof



La Zamenhof-jaro, solene inaŭgurita ĉe Unesko la dekkvinan de decembro pasintjara estas la centkvindeka jaro de la vivo de mia avo, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Mi insistas pri la vortoj ”de la vivo”, ĉar tio signifas, ke Li daŭre estas vivanta, almenaŭ virtuale, vivanta en niaj koroj, danke al Liaj idealoj, konstante aktualaj. Tiel la idealo de toleremo, de respekto de aliulo malsama, ĉu pro la koloro de lia haŭto, ĉu pro lia religio, ĉu pro lia kulturo kaj pro la lingvo tiun kulturon esprimanta. Li bone konsciis, ke la diverseco, la multnombro de diversaj kulturoj,

konsistigas grandan riĉecon de homaro, riĉecon ĉiuriske savendan. Sed Li ankaŭ konsciis, ke por eviti, ke tiu diverseco nasku malamikecon, necesis havigi al la diversaj socioj eblan komunikilon pere de lingvo neŭtrala, la dua lingvo por ĉiuj, lingvo ne celanta substitui ĝin al la lingvoj gepatraj.

Sed kiu Li estas, Ludoviko Lazaro, kreinto, aŭ kiel Li preferis esti nomata, ”iniciatinto” de tiu lingvo internacia? De kie Li venas? El kia lando de nia terglobo? Ni povas legi, gravuritan sur unu el Liaj monumentoj, la eltiraĵon de Lia parolado en kiu Li aludis ”Litovion, Lian karan patrujon”. Tamen, en alia parolado, Li prezentiĝis ”filo de Pola tero, tero sur kiu Li naskiĝis, sur kiu Li vivis kaj laboris, tero en kiu Li deziris esti entombigota”. Ĉi-rilate la kontraŭdiro estas nur ŝajna, ĉar la regiono de Bjalistoko, kie Li naskiĝis, estis iam parto de la Respubliko de Du Popoloj, originanta de la Pol-Litova Unio decidita komence de la dekkvina jarcento. Ĝi tiam ampleksis teritoriojn etendiĝantajn inter la Balta ĝis la Nigra Maroj. Ĝin fakte priloĝis ne nur Poloj kaj Litovoj, sed ankaŭ Rutenoj, prauloj de Bjelorusoj; Kozakoj, prauloj de Ukrainoj; kaj ankaŭ Judoj, kies multnombra komunumo tie instaliĝis jam inter la dekdua kaj la dekkvara jarcentoj. Tamen en la jaro de la naskiĝo de mia Avo la Respubliko de Du Popoloj ne plu ekzistis; la urbo Bjalistoko estis tiam aligita al la regiono de Grodno. Sekve, laŭjure, Zamenhof estis Rusa regato, la Juda nacieco estinte enskribita en Lia pasporto.

Kiu do finfine Li estas, Doktoro Esperanto: ĉu Polo, Litovo, Ruso, aŭ Judo? Cetere en Hispanio Li portas la medalon de Izabela la Katolika, en Francio Li estas Kavaliro de la Honora Legio, dum multaj monumentoj starigitaj memore al Li, stratoj kaj placoj dissemataj tra kvindekda landoj de la terglobo portas Lian nomon. Li jam respondis: Li estas Homarano, Li do apartenas al la tuta homaro.

Li sekve ĝojas observante la falon de muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj, muroj, kies detruon Li kantis en siaj profetaj poemoj. Li ĝojas observante la popolojn iam malamikajn, formantajn grandan rondon familian tra la tuta Eŭropo kaj baldaŭ tra la tuta mondo. Nur mankas al tiu rondo familia la komunikilo neŭtrala, respektanta

lingvojn naciajn, vehiklojn de kulturaj riĉecoj; mankas lingvo internacia, kiu ne penus al ili substituiĝi. Ni esperu baldaŭan malaperon de tiu manko. Ni esperu: la espero estas ja simbolo de nia Esperanto.

Tamen ni ne nur esperu. Ni ankaŭ laboru por kontribui ke la Zamenhof-Jaro, kulminonta en Bjalistoko dum la venonta Jubilea Kongreso, estiĝu grava paŝo sur la vojo al la epoko, kiam homoj nian lingvon parolante ne nur komuniku sed amikiĝu!

Louis C. Zaleski-Zamenhof

Ĝustigoj

En la artikolo Cent jaroj de Esperanto-ekzamenoj en Danlando – 1908-2008 (EeD, n-ro 4, 2008) – kies titolon la redaktoro ŝanĝis sen mia aprobo – bedaŭrinde enŝteliĝis eraro lia-flanke en la tabelon: Aĝo de la ekzamenaj kandidatoj 1928-2008 (p. 14): La lasta kolono ne indikas la aĝon de la IIIa-graduloj, sed tiun de la personoj, kiuj faris la ekzamenon pri instru-kapablo, do III estu •.

Mogens Rude Andersen

Poemo ”La Feliĉo”. Kara Jens Larsen. Pri la poemo La Feliĉo mi povas informi vin ke en la jaro 1967 UEA eldonis diskon kie Ramona van Dalsem kantas tiun poemon kiun ŝi mem skribis kaj ankaŭ faris melodion por tiu kanto. Plej amike, via Ulrik Rasmussen.

Ŝtelo. Al la redaktoro kaj la prezidantino. Plej nova numero paĝo 16 – la poemo estas ŝtelita ĉe Ramona van Dalsem, la fama Esperanto-najtingalo. Amike salutas Bent Holm-Laursen.

La redakcio dankas por la reagoj, kaj pardonpetas por la eraroj.

Ne forgesu aliĝi al la jarkunveno 25/26a de aprilo al
kasisto Arne Casper!

Memoru ke estu antaŭ la 15a de marto, ĉar tiun daton
la kotizo plialtiĝos!

Kopenhago

La klubo de KEK komencis la jaron 2009 kunvenante en la Kultur-Domo ĉe Dortheavej. Fine de januaro ni transklokiĝis al la nova klubejo en Tomsgårdsvej 35, kiu situas proksime al la Kulturo-Domo. Tial oni povas ankoraŭ manĝi en la restoracio antaŭ ol la partopreno en la klubaranĝoj.

- 16.02.2009 la 21-a februaro estos la 10-a Internacia Patrinlingva Tago. Ĉe <http://www.uea.org/informado/un-deklaro.html> Deklaro de UEA pri [lingvaj homaj rajtoj](#) videblas la deklaro de UEA pri "Lingvo, Lingvaj Homaj Rajtoj, kaj Evoluo". Ĝi estas publikigita en februaro 2005 okaze de la 61-a Sesio de la Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, sed ne ekzistas en dana traduko. Ni proponas, ke oni kunvene danigu kaj post tiam sendu ĝin al la gazetaro okaze de la patrinlingva tago.
- 23.02.2009 **Jarkunveno de KEK.** Tagordo kaj Jarraporto estas dissenditaj kun PONTO.
- 02.03.2009 Prelego de Regin Larsen, kiu ekkomprenigos nin pri la mirindaj eblecoj por esperantistoj ĉe la interreto.
- 09.03.2009 Studgrupo
- 16.03.2009 Kunportu kaj priskribu io ajn?
- 21.03.2009 SEA Kunveno en Kopenhago
- 23.03.2009 Ni parolu pri legitaj libroj.
- 30.03.2009 Studgrupo
- 06.04.2009 Plezuroj kaj malplezuroj de vortara kompilanto. (Jens S. Larsen)
- 13.04.2009 Pro **Pasko** neniu kunveno.
- 20.04.2009 Studgrupo.
- 27.04.2009 Prelego pri Vikopedio. (Rut Jesus)



Daŭre okazas kursoj en KEK. Maldekstre la komencantoj de Arne Casper, dekstre la daŭrigantoj de Regin Larsen.

Næstved

**Kunvenejo: Ĉambro 111 en la kazerno de Grønnegade, Grønnegade 10B.
Rimarku la diversajn komenciĝo-horojn!**

Ve 13.02. je h 19.00: DEFA-kunveno: Vintra Internacia Fervoja Esperanto-Semajno – la unua post 49 skisemajnoj. Ĉiuj estas bonvenaj aŭskulti.

Ve 20.02. je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN. Tagordon vidu sur paĝo 2. Je h 19.30 la unuigita regalo per kafo/teo.

Ve 27.02. je h **14.00**: Kunveno kun pritrakto de ĉapitro 28 de *F+F*.

Ve 06.03. je h 19.30: Danlingva prelego. Peter Weide rakontos. Konata denaska esperantisto kun radikoj en Danio kaj Germanio, nun loĝanta en Melby, Norda Selando. Komuna manĝado je h 18.00 laŭ samaj kondiĉoj kiel 09.01. Aliĝo al tio plej malfrue 03.03.

(Ve 13.03. je h 19.00: Ĝenerala kunveno de DEFA. Nur por membroj.)

Ve 20.03. je h 19.30: Kunveno kun pritrakto de ĉapitro 29 de *F+F*.

Ve 03.04. je h 19.30: Sezonsfina vespero kun diversa distro kaj ujutno, eventuale kun pritrakto de la pasinta sezono.

100-jara datreveno de Ivo Lapenna



Du gravaj datrevenoj en 2009: D-ro L.L. Zamenhof (150-jara) kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna (100-jara).

La Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna, prez.: Prof. D-ro Carlo Minnaja (redaktoro de *Eseoj* memore al Ivo Lapenna. 29 konataj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi ĉarma kaj interesa 417-paĝa verko), kaj la Fondaĵo Ivo Lapenna, prez.: D-ro Klaŭs Perko, instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, E.-klubojn, E.-kunvenojn k.s. ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia hejmpaĝo: dokumentoj, paroladoj, fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la adreso: www.ivolapenna.org.

Birthe Lapenna

Esperanto kaj Martinus dum 70 jaroj

En januaro 1939 Martinus rekomendis Esperanton en la revuo "Kosmos".



En la jaro 1932 fondiĝis la Martinus-Instituto per la eldono de la unua volumo de Livets Bog (La Libro de la Vivo), verkita de la dana filozofa Martinus (1890-1981). En la jaro 1933 aperis la unua numero de Kosmos, la revuo de la Martinus-Instituto. Jam en januaro 1939, nun antaŭ 70 jaroj, en Kosmos n-ro 1/1939, Martinus unuafoje skribis favore pri Esperanto (en mia eldanigo):

Kiel la legantoj eble jam vidis, la revuo Kosmos enhavas kolumnon kun teksto en la internacia komuna lingvo "Esperanto". Ĉar multaj danoj uzas tiun lingvon kaj havas vastajn kunligojn kun esperantistoj en diversaj landoj, ni tiel malfermas fenestron al la granda mondo.

Por ne malfavori tiujn, kiuj ne komprenas Esperanton, la artikolo ankaŭ aperas en la revuo en dana lingvo. Ambaŭ versioj aperas en la revuo tiel, ke sendamaĝe por aliaj tekstoj oni povas eltondi la artikolon por sendi ĝin al fremdaj esperantistoj.

Esperanto estas planita lingvo, konstruita de la pola kuracisto L. Zamenhof (1859-1917), kiu publikigis la lingvon sub la kaŝnomo Dr. Esperanto (esperanta homo) por tiel krei internacian helplingvon. Kompare al aliaj similaj lingvoj Esperanto senkonteste havas grandajn avantaĝojn, kaj ŝajne estas la sola planita lingvo, kiu pruvis sian taŭgecon (i.a. en diversaj kongresoj).

Esperanto forte evoluadis, sed iom stagnis dum la unua mondmilito. Sed nun ĝi denove forte evoluas, kaj pro sia granda simpleco kaj facileco ĝi certe gajnos grandan lokon en la internacia evoluo.

En tia internacia laboro, kiu prezentiĝas pere de "Livets Bog" kaj la revuo "Kosmos", Esperanto ŝajne povas esti de grandega utilo kiel portempa ponto inter la dana lingvo kaj la fremdaj lingvoj, kiujn parolas eksterlandaj interesatoj de mia laboro. Pere de Esperanto multe da interesatoj tra la mondo senprokaste povos kontaktiĝi kun mia laboro, ĉar ili ne bezonos atendi la estontan tradukon en la grandajn mondlingvojn.

Esperanto tiel estas ponto inter la dana kaj ĉiuj fremdaj lingvoj. La ĉino kaj ruso, la hindo kaj japano, same kiel ĉiu unuopa eŭropano pere de esperanto same facile trovos vojon al kompreno al tio, kion ni deziras skribi al ili en nia revuo. Tio do estas la unua eta klopodo serĉi atenton dise en la granda mondo.

Per tio komenciĝis nova suplemento al nia internacia laboro. Se la intereso estas sufiĉe granda, ni starigos Esperanto-kurson en la kadroj de la instituto. Povos havi grandegan signifon por la disvastigo de mia verko, se kiel eble plej multaj de ĝiaj amikoj lernos Esperanton.

Martinus pri internacia mondlingvo en 1964:

Estas nature kaj klare, ke en la monda ŝtato aŭ internacia monda regno oni ne lame iros per naciaj lingvaj lambastonoj, per interpretistoj kaj pli aŭ malpli malbonaj tradukoj. La monda ŝtato kompreneble havos sian propran specialan internacian lingvon. Ĉiu unuopa infano en la lernejoj en la tuta mondo ricevos edukon en tiu internacia lingvo de la monda ŝtato. Imagu kia faciliĝo estos por la homoj de tiu tempo tute ne havi lingvajn barojn, senkonsidere kie ajn ili troviĝos sur la tero. Ĉiuj homoj en la mondo, de la sudo kaj la nordo, de la oriento kaj la okcidento, povos interparoli, povos interkompreniĝi. Per komuna lingvo la tuta mondo estos komuna patrolando por ĉiuj homoj sendepende de nacieco, kulturo kaj raso. Imagu kia faciliĝo aŭ laborŝparo, ke ne necesos traduki iajn ajn librojn aŭ skribaĵojn. Ĉiuj povos legi ĉion. Ke neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos uzata kiel tiu komuna lingvo, tio kompreneble estas tute certa. Neniu ajn el tiuj naciaj lingvoj estus uzebla sen eventuala estiĝo de ĵaluzo aŭ amaro, eble eĉ ankaŭ milito. Tial la mondo havos neŭtralan internacian lingvon. Kiam oni komencos instrui ĝin en ĉiuj lernejoj de la mondo, la infanoj, kiuj lernos ĝin, atingos la kapablon interparoli sendepende de nacieco kaj raso. Tio kontribuos al multe pli granda unuiĝo de la homoj en amikeco kaj paco, kaj daŭre pli altgrade faros ilin interligita frata popolo en la tuta mondo.

(La Eterna Mondbildo 2, paragrafo 26:25)

La revuo KOSMOS

KOSMOS estas revuo pri la Kosmologio de Martinus, la eterna mondbildo kaj la nova mondkulturo. Ĝi traktas aktualajn okazaĵojn de la vivo laŭ kosma perspektivo kaj la aktivadon de Martinus-Instituto. La revuo estas eldonata seslingve: angle, dane, Esperante (ekde 1995), germane, nederlande kaj svede, sed havas parte malsaman enhavon kaj malsaman eldonritmon. Esperanto-KOSMOS aperas dufoje jare.

La kosmologio de Martinus

La scienco montras ke ĉiuj ŝanĝoj en la fizika materio estas leĝoligitaj. La dana verkisto Martinus (1890-1981) elmontras ke ankaŭ troviĝas leĝoj por la pensado. Scio pri tiuj naturleĝoj ebligas al la tera homo ekregi sian menson kaj laŭ la tempo krei mondregnon de amo sur la tero. Martinus nomis siajn du ĉefverkojn “La libro de la vivo” (en sep volumoj) kaj “La eterna mondbildo” (en kvar volumoj).

Martinus-Centro en Klint

En 1935 estis fondita feriejo ĉe la vilaĝo Klint en Danio, kiu poste fariĝis la unua Martinus-Centro. Ĉefe kaj unue Martinus-Centro estas instrucentro. La bazo de la instruado estas la verkaro de Martinus. En Klint okazas kursoj kaj prelegserioj en agrabla kaj paca ĉirkaŭaĵo tuj apud maro, somere, printempe kaj

aŭtune. Plejparte venas homoj el Skandinavio (Danio, Svedio kaj Norvegio), sed pli kaj pli la centro fariĝas vere internacia centro, vizitata de diverslingvanoj. Martinus-Centro bonvenigas tiun evoluon, aranĝante diverslingvajn prelegojn kaj studrondojn, utiligante sistemon por interpretado plur-lingven. Sed ne eblas nek indas ĉiam kaj ĉie interpreti, kaj oni de kelkaj jaroj instruas Esperanton dum la nacilingvaj kursosemajnoj kaj havas instruadon pri la kosmologio ankaŭ en Esperanto.

Martinus-Instituto kaj Esperanto

En Kopenhago situas instituto kiu okupiĝas pri diversaj aferoj ligitaj al la kosmologio de Martinus, kiel ekzemple administrado, tradukado, eldonado kaj informado pri lia verkaro. Ĝia agado ankaŭ rilatas al Esperanto. En sia kunsido la 5-an de aprilo 1965, la konsilio unuanime decidis deklari Esperanton la internacia lingvo de la instituto kaj ties internacia laboro. Kune kun tiu decido, estis aprobita deklaro, el kiu la sekva citindas:

Estas fakto, ke la homaro niatempe troviĝas en evoluo direkte al tiu internaciismo, kiun partopreni fariĝos vivpremisio por ĉiu ŝtato kaj ĉiu homo. Ni estas tute kaj plene konvinkitaj ke neniel eblas elekti nacian lingvon por tiu internacia statuso.

La konataj, dokumentitaj faktoj pri Esperanto, la agnosko de gravaj oficialaj instancoj, ties facileco, fleksebleco kaj esprimovo kaj fine ankaŭ ties praktikaj atingoj, montras decidigan probablecon por la elekto de ĝi kiel definitiva monda lingvo.

Sendepende de la sinteno de la cetera mondo rilate la internacian lingvoproblemon, Esperanto estas ilo, kvazaŭ kreita por la celo de la instituto.

La naciaj lingvoj tamen ne estu flankenŝovitaj aŭ taksataj malpli alte. Male. Estas absolute memevidente, ke ankaŭ kiu ajn nacia lingvo estu uzata, kiam tio estas ebla kaj celtaŭga.

La decido pri Esperanto ankaŭ estas forta instigo al ĉiuj interesitoj, se eblas, mem lerni la lingvon kaj per tio pliigi la utilon por aliaj kaj novaj interesitoj. Plue, la decido estas instigo, en ĉiu maniero subteni la klopodojn de aliaj, kaj per tio pligrandigi la utilon de Esperanto por la celo de la instituto kaj la ĝenerala interhoma perado de la mondkulturo.

(La Kunlaborstrukturo 6:4)

Martinus pri Zamenhof kaj Esperanto

Martinus neniam menciis Esperanton en siaj libroj, sed kelkfoje li parolis pri Esperanto dum kunsidoj, demandohoroj kaj prelegoj. Ekzemploj de tio sekvas ĉi-sube:

Dum konsilia kunsido en 1974: *“Mi opinias ke ni estas iom fruaj rilate Esperanton, sed alie ĝi ege bonas. Sed ĝi venos iam, kaj tiam estos grandioze. Estus ja bele se ĝi venus rapide. Sed fariĝos Esperanto. Kio alie? Ĉu troviĝas aliaj lingvoj pli progresintaj?... Neniu alia lingvo estas same humana. Oni rigardu la kreinton. Li ja estis treege humana homo. Oni preskaŭ povas vidi ke li estis elektita tion fari.”*

Dum prelego en 1956 Martinus diris: *“Ni vidas ke ekzistas tentencoj evoluigi aliajn lingvojn, lingvoj kiuj ne estas naciaj lingvoj, sed internaciaj lingvoj. Ni vidis idealiston krei mondolingvon, Esperanto, kiu ludos grandegan rolon, pro tio ke ĝi estas kreita laŭ la diecaj principoj, kaj pro tio ke ĝi estas logika, kaj pro tio ke ĝi estas facile lernebla.”*

En 1968 Martinus ricevis la demandon: *“Ni ĉiuj ja parolos la saman lingvon iam en la estonteco. Kiun lingvon?”*. Kaj Martinus respondis jene: *“Esperanto! Ĝin ni parolos. Ne estas pro tio ke mi estas esperantisto aŭ ke estas modo, sed iĝos pli kaj pli necese ke oni havos komunan lingvon. ... Imagu kia faciligo estus se oni regus la saman lingvon. Laŭ ĉiuj manieroj ĉiuj homoj povus interkomunikiĝi. Tio ankaŭ kreos pacon. Tio ke oni ne povas interkompreniĝi kontribuas hodiaŭ en alta grado al malpacaj pensoj. Faciliĝos la kunumado kaj la disvastigo de la amo kiam ĉiuj povos interparoli tute flue.”*

Ole Therkelsen * ole@martinus.dk * www.oletherkelsen.dk



Kurso en Esperanto pri la Kosmologio de Martinus okazos 01.08 - 08.08.2009 en la Martinus-Centro, Klintvej 69, Klint, DK-4500 Nykøbing Sj. Por aliĝi oni turnu sin al la Instituto de Martinus, Mariendalsvej 96, DK-2000 Frederiksberg.

Telefono: (+45) 38 34 62 80, Fakso: (+45) 38 34 61 80

Rete: <http://www.martinus.dk> - info@martinus.dk

Kultura Esperanto-Festivalo

La festivalo KEF denove okazos en Danio. Ĉi-foje estos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. La datoj estas de la 7a ĝis la 12a de julio 2009.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturalan Esperanto-Festivalon. Ĝi estas festivalo kie ni prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon. Ĝenerale la unuaj tagoj de la festivalo estas pli metiejaj kaj la lastaj tagoj estas pli distraj. La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos primitive kaj tiamaniere la kostoj ne estas tiel altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi en migrulhejmo aŭ en hotelo por aldona kosto.

Amaso da bonaj konataj Esperanto-artistoj venos, ni menciuj en hazarda ordo: Ĵomart kaj Nataŝa, Martin Wiese kaj la Talpoj, Sten Johansson, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Initials dc, la Pafklik' kaj Jonas/Mathias. Flo de Vinilkosmo agados, amuza metiejo okazos kaj infana grupo ludos.

Vidu ĉe www.kef.saluton.dk pri pli da detaloj, la diversaj metiejoj kaj kotizo. Jen eltirajo:



"Fek' al Esperanto", la plej nova eldonaĵo de la franca hiphopa duo La Pafklik'

Por A-landanoj (Danio, Svedio, Norvegio, Germanio) la programo kostas:

Aliĝperiodo	Aĝo < 20	Aĝo < 30	Aĝo 30+
1 (ĝis 5a de januaro)	400	550	650
2 (ĝis 16a de aprilo)	450	600	700
3 (post 16a de aprilo)	550	700	800

Unutagaj biletoj	por ĉiuj
1 (ĝis 5a de januaro)	100
2 (ĝis 16a de aprilo)	125
3 (post 16a de aprilo)	150

La KEF-teamo

Pensoj de desegnisto pri komuna lingvo



Antaŭ proksimume 4-5 jaroj mi sekvante lecionon de franca lingvo en la unua klaso de gimnazio malbenegis la neregulajn verbojn. Kial estu tiel malfacile? Kial mi bezonas lerni tion? Mi ĉiuokaze ne planadis vojaĝi al Francio, kaj demandante al miaj gepatroj kiel multe ili memoras de la germana lingvo, mi ne ricevis kuraĝigan respondon. – Do, kial mi estus pli sukcesa, ja mi eĉ ne intencis uzi la lingvon?

Tial mi kreis ŝerce mian propran organizon, kiun mi nomis T.N.F.H.D.S.S. Tio estis mallongigo de "Tal nu for helvede det samme sprog" (parolu jam do diable la saman lingvon), sed mi ne sciis kiu lingvo ĝi estu. Ne sciis, ĝis samklasano rakontis al mi pri malnova mortinta planlingvo, kaj vi certe jam divenis kiu estis. Kaj kiom mi ĝojas ke iu povas diveni tion. Tio nome signifas ke Esperanto ne estas morta, sed vivanta lingvo ĉar vi, la leganto, scias pri kio mi parolas.

De kiam mi malkovris ke jam ekzistas facila kaj efika internacia planlingvo, mi klopodas por lerni ĝin. Tamen dum iuj periodoj pli ol dum aliaj. Tuj komence iris tre bone; pluraj miaj samklasanoj estis interesitaj pri la lingvo, kaj ni fakte starigis grupeton, kie ni instruis unu al la alia Esperanton ĉiun ĵaŭdon dum la manĝopaŭzo. La "instruisto" havis sian scion el reta kurso, kaj nur bezonis esti unu lecionon antaŭ la "lernantoj". La afero fakte tiom progresis, ke la temo de nia kanto en la ĉiujara kanzon-konkurso de la lernejo estis Esperanto.

Sed mi forlasis la gimnazion post la unua klaso, kaj la lernado de la lingvo komencis limaki. Post la somerferio la Esperanto-grupo neniam refunkciiĝis, kaj mi mem iris al Odense por lerni animacion, do tiel ekhavis aliajn aferojn por prizorgi. Tiutempe mi nome kredis ke mi volas fariĝi animaciisto, kaj mia granda revo estis akceptiĝi en tre populara animacia lernejo en Viborg. Sed post mia unua lernoĵaro ĉe lumtablo en Odense klariĝis al mi, ke mi devas daŭrigi la desegnadon, sed ne fari animacion. Mi volis fari ion kie mi povos mastri la tutan procezon.

Nun, post du pliaj desegnadlernejoj, mi retranslokiĝis al Kopenhago kie mi provas komenci profesion de ilustrado, samtempe studante kelkajn gimnaziajn fakojn, kaj kompreneble klopodante ĉeesti la ĉiulundan Esperantokurson. – Sed ĝuste nun apektas iom malprosperere, ĉar mi havis la bonŝancon rajti instrui desegnadon al ses infanoj ĉiun duan lundon, kaj tiel ja estas iom malfacile uzi la saman tempon por Esperanto. Sed mi rigardas tion kiel ŝajnproblemon, kaj mi certe iam ĝin lernos. Mia revo estas paroli ĝin flue, antaŭ ol ekhavi infanojn, tiel ke miaj infanoj ĝin lernos tute nature, kiel gepatran lingvon, same kiel la danan.

Oni povas vidi miajn desegnaĵojn kaj pentraĵojn en mia blogo:

www.rasme.blogspot.com. (Mi origine havis ankaŭ retpaĝon tradukitan al Esperanto, kia bedaŭrinde ne estas mia blogo. Almenaŭ ne ankoraŭ).

Rasmus Aagaard

EU-Parlamenta laboro



Margareta Handzlik kiel membro de Eŭropa Parlamento jam duan fojon ĉijare sendis al Nobel Komitato rekomendon pri Universala Esperanto-Asocio (UEA) por la Nobel Premio pri Paco por la jaro 2009.

Jam subtenita en 2008, tiu propono havis vastan eĥon en amasinformiloj de diversaj landoj. Oni plejofte parolis pri Nobel premio por Esperanto kvankam, kompreneble, lingvo ne povas ricevi tian premion. Do, se ĝi estus atribuita, ricevus ĝin, por la komuna bono, la plej reprezenta Esperanto-asocio. Se vi konas deputitojn (de asembleoj eŭropaj aŭ naciaj), aŭ membrojn de registaroj kiuj subtenas Esperanton, valoras kontakti ilin kaj havigi al ili seriozan dosieron, same pri profesoroj pri juro, politikaj sciencoj, historio kaj filozofio, iamaj laŭreatoj de la Nobel Premio.

Membrino de Eŭropa parlamento Ljudmila Novak prezentis la 21-an de januaro 2009 al la Kultura Komitato de la Eŭropa Parlamento (kadre de debato pri la raporto/opinio pri mult-lingveco de Vasco Graca Moura) tri proponojn pri ŝanĝoj en ĝi:



La unua ”konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel »lingua franca«”;
la dua ”proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulant lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto”, kaj la tria ”konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similan efikon povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo”.

Kiel civitano de EU oni povas subteni la iniciaton de s-ino Novak ĉe la adreso <http://minilien.fr/aojnyb>, kie oni ankaŭ povas legi la precizan vortumon de la proponoj. La debato pri la tri proponoj en la Kultura Komitato okazos la 16-an de februaro. Se la Komitato aprobos ilin, ili kiel tuto pluiros al la Eŭropa Parlamento.

Esperanto en Usono

Oleg Izyumenko, rusa studento loĝanta en Svedio, fine de la pasinta jaro lanĉis kampanjon ĉe la usona retejo change.org, kiu okupiĝas pri prezentado de proponoj al la nova usona prezidento. La propono de Oleg estis "enkonduki Esperanton kiel fremdlingvon en la usonaj lernejoj". Jen la esenco de lia raporto:



The image shows a screenshot of a Change.org petition page. At the top, the Change.org logo is visible on the left, and navigation links for Home, Causes, People, and Nonprofits are on the right. The main heading reads "IDEAS FOR CHANGE IN AMERICA". Below this, a quote from President-elect Barack Obama is displayed: "I WILL OPEN THE DOORS OF GOVERNMENT AND ASK YOU TO BE INVOLVED IN YOUR OWN DEMOCRACY AGAIN." — PRESIDENT-ELECT BARACK OBAMA. The central title of the petition is "Introduce Esperanto as a foreign language subject in schools to help American kids succeed". To the right of the title, there is a "Voting Results" section indicating that the idea qualified for the 2nd round with 3,507 votes during that period. Below the title, there is a short paragraph of text explaining the petition's purpose, followed by a "Read More" link. At the bottom right, there is a section for "Endorsements for this idea".

Karaj esperantistoj,

La kampanjo ĵus finiĝis. ĝi kaŭzis al mi multajn emociojn (ĝojajn kaj malĝojajn), pensojn (pozitivajn kaj negativajn) kaj agojn (tiujn juĝu vi). Mi volas plej elkore danki vin ĉiujn – apogantojn kaj skeptikulojn – pro tiuj travivaĵoj. Nur antaŭ paro de monatoj mi ne kredus ke tio ankoraŭ eblas en Esperantio.

Jam en la frua komenco tiu ĉi ideo kaj tiu kampanjo estis multe diskutataj kaj analizataj. Kiel multaj el vi rimarkis, mi mem ĉiam tenis min ekster tiuj debatoj kaj ne malkovris miajn proprajn analizojn, anstataŭe preferante koncentriĝi je agoj – strategia planado kaj mobilizo. Multaj – vere multaj, precipe por esperantistoj – respondis al mia alvoko kaj helpegis dum la kampanjo. Mi malkovris por mi ekziston de tute surprizaj aktivulaj talentoj en la Esperanto-movado, antaŭe al mi nekonataj.

Sed hodiaŭ, je la tago kiam la kampanjo estas finiĝinta, mi permesas al mi dividi kelkajn el miaj finaj analizoj. Mi publikigas parton de ili, sub la temo "Kiu gajnis pro la kampanjo?"

Kiu do gajnis pro la kampanjo?

- Change.org, kiu varbis milojn da novaj uzantoj kaj registris centojn da organizoj. Jen la plej granda kaj feliĉa gajninto de la tuta afero!!
- UEA.org (permesu al mi skribi UEA.org anstataŭ simple UEA, kaj vi komprenos je kio mi aludas)
 - kiu subite – kaj 10 jarojn pli malfrue ol necesis, sed pli bone malfrue ol eĉ pli malfrue aŭ tute neniam – ekkonsciis pri neceso komuniki en Interreto per kanaloj, kiuj kuŝas ekster ĝia posedo.
 - kiu simple ekkonsciis pri ebleco kaj neceso denove – post paŭzo kiu daŭris jardekojn – komuniki rekte al individuoj ekster la movado. Ne pensu ke mi kritikis UEA-n – tute male: mi simple vere festas tiun vekigon!!
 - kiu ekmalkovris por si novajn interretajn rimedojn – ekster la organizaj hejmpaĝoj, retpoŝto, dissendolistoj kaj retgrupoj – kaj ekparolis lingvon alian ol Esperanto (ĉar se ĝi pluparolus nur Esperanton, neniu krom jam ekzistantaj esperantistoj ĝin aŭdus – kaj eĉ tiuj ne tiom interesiĝis aŭskulti dum la lastaj 8 jaroj).

Tio ĉi okazis *nur* – ni ne trompu nin – pro kuraĝo de la plej supraj UEA-oficuloj, instigataj de kelkaj novpensantaj kaj entuziasmaj E-aktivuloj kaj malpli supraj movadanoj. Tiuj lastaj jam konas siajn nomojn, kaj ili estis multaj, do mi ne mencias ilin rekte. Sed la UEA-gvidantojn, kiuj havis kuraĝon ĝuste ekgvidi, mi plezure mencias ĉi tie: la ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller kaj la prezidanto de UEA Probal Dasgupta, ankaŭ estrarano de UEA Ranieri Clerici kaj oficisto Roy McCoy. Ilin, krom la individuaj aktivuloj kaj volontuloj, puŝis desube estroj de la landaj sekcioj, naciaj movadoj (inkluzive junularajn), lokaj E-klubo...

- kiu, se ĝi kuraĝos daŭrigi laŭ la sama vojo, baldaŭ malkovros radikale novan – kaj parte novgeneracian, sed ne nepre kaj ne nur – specon de aktivuloj por Esperanto. Antaŭe ĝi konis nur kelkdekon da E@I-anojkvazaŭ "de ekstere", nun ĝi mem preparas grundon por forta enfluo de amasoj da tiaj freŝe pensantaj kaj efike agantaj personoj en movadajn vicojn. Tiuj personoj konas siajn nomojn, kaj ni ĉiuj ekkonos ilin baldaŭ.

Kaj la nova movado ne similos al la malnova. Ĝi estos pli kiel reto de agemaj volontuloj ol hierarkio de ambiciaj aktivuloj. Ĝi rigardos eksteren anstataŭ internen. Ĝi parolos Esperanton, la anglan, la hispanan, la francan, la ĉinan, la rusan kaj aliajn lingvojn, anstataŭ nur Esperanton. Ĉu mem UEA restos grava parto de tiu movado, ankoraŭ estas malferma demando. La respondo dependos de sinteno kaj agado de UEA mem.

- la Esperanto-komunumo
 - kiu subite denove eksentis sin kiel Esperanto-movado, kvankam ne simila al la malnova,
 - kiu subite reinspiriĝis kaj denove kuraĝis esperi je siaj sukcesoj kaj venkoj,
 - kiu ene de unu monato alvenis al dolĉa konkludo: *Jes, ni povas!*

Kore kaj kunlabore,

Oleg Izyumenko

Informofilmo

”E@I”, la komputilfaka asocio de TEJO, eldonis ĉi tiun 43-minutan informofilmon, kiu celas montri Esperanton kiel vivan, uzatan kaj tre ŝatatan lingvon de multaj homoj. La unuopaj ses partoj estas rigardeblaj ankaŭ tute memstare, ĉar ĉiu traktas la temon Esperanto en alia maniero.

La intenco estas ke la filmo informu milojn da homoj pri la taŭgeco de Esperanto por internacia komunikado, kaj ke la filmo donu tiom bonan impreson, ke multaj ankaŭ ekdeziros lerni la lingvon. Efektive jam pluraj landaj televidoĵ transprenis partojn de la filmo por raportoj pri Esperanto. La frapfrazo de la filmo estas: ”Esperanto estas... lingvo lerninda!”.

La filmo estas aĉetebla ankaŭ ĉe la Libroservo de DEA.

Esperanto estas internacia vivanta lingvo — se vi ne konas ĝin, aŭ kredas, ke ĝi ne plu funkcias, jen filmo por vi!

Filmo kiu prezentas la internacian lingvon

ESPERANTO estas... en moderna kaj vigla maniero.

Esperanto estas...

- parto 1 - ...lingvo taŭga por ĉio (01-43 min)
- parto 2 - ...lingvo kun multaj trajtoj (08-31 min)
- parto 3 - ...lingvo uzata plurmaniere (06-23 min)
- parto 4 - ...lerninda kaj lernebla por ĉiuj (13-22 min)
- parto 5 - ...lingvo kun bunta movado (04-12 min)
- parto 6 - ...lingvo de la estonteco (09-31 min)

Spertu la bonan etoson de „internacia familio”, loĝanta ĉie en la mondo, kiu tre ŝatas multmaniere uzi la lingvon. Post la filmo vi scios multon pri „Lingvo Internacia” kaj ĝia bunta komunumo. Vi ricevos realan bildon pri Esperanto, rakontitan de tiuj kiuj vere konas kaj uzas la lingvon. Spektinte la filmon vi eble eĉ volos ĝin mem lerni !.

La filmo, dividita je 6 partoj, estas rezulto de 3-jara projekto (2005-2008) kaj estis kreita en internacia kunlaboro de pluraj filmemuloj, sed ĉefe de la filmkreato Rogener Pavinski el Brazilo kadre de la organizo E@I — www.iks.net.

+ fotoj
+ kromaj intervjuoj
+ koncerteroj

EDUKADO@INTERRETO prezentas “ESPERANTO ESTAS...”
montado, filmado kaj teksto rogener PAVINSKI, ideo, teksto kaj kunordigado hokan LUNDBERG
enhav-konsilioj kaj filmado peter BALAZ, voĉoj arono CHAPMAN, karlina DALEY
dvd-kreado kaj grafikoj KOSMUZIK eldono ESPERO por E@I

La enhavo de la DVD-video oni rajtas kopii, distribui kaj uzi por nekomerciaj celoj kondiĉe, ke ĝi estas kopiata senŝarĝe kaj inkluzive de tiu ĉi kopirajto-teksto. Alia uzo de la enhavo estas nur kun konsento de E@I kaj Kosmuzik, pri tio kontakti nin ĉe la adreso dvd@iks.net

20 subtekstaj lingvoj + 6 voĉaj lingvoj + filmaj aldonaĵoj

Somera Esperanto-Studado

SES-2009 okazos inter la 10-a kaj la 18-a de julio 2009 en Modra, Slovakio



Jen la partoprenantaro de la pasintjara SES

Ĉi-jare la aranĝon gastigas denove malgranda urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava.

La programo konsistos el kelkaj partoj:

Antaŭtagmeze - instruado de Esperanto;

Posttagmeze - ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp;

Vespere - nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, filmspektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4-5 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Fine de la aranĝo la partoprenantoj ricevos atestilojn pri 26-hora kurso laŭ la niveloj de nova eŭropa referenckadro pri lingvo-instruado de A1 ĝis C1.

Nova eblo ĉi-jare! Por instruemuloj, kiuj jam bone regas la lingvon, ni proponas seminarion *Flugiloj de malfacila vento*, realigotan kunlabore kun ILEI. Plia novaĵo de la aranĝo estas eblo pasi ILEI-ekzamenojn.

Aliĝkotizo: ĝis 30a de marto 35 € ; ĝis la 30 de aprilo 45 € ; post la 1-a de majo 55 €.

Manĝokotizoj: tuttaga manĝo 11 € ĉiutage ; nur matenmanĝo 3,30 € ĉiutage.

Loĝkotizo: 12 € por tago, 96 € por la tuta aranĝo.

Adreso de la SES-ejo:

Študijné stredisko ÚJOP ČĎV UK Modra- Harmónia

Modra- Harmónia č. 3553 * SK-900 01 Modra, Slovakujo

Por pli da informoj vidu: http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php

aŭ informiĝu ĉe la ĉef-organizanto:

Peter BALÁŽ petro@ikso.net telefone +421 902 203 369

UEA ĉe lingvotestistoj

Danke al plurjara laboro de la Referenckadra-projekto, en aprilo 2008 UEA/ILEI estis reprezentita en Cambridge de Zsófia Kóródy en la konferenco de ALTE (Asocio de Lingvotestistoj de Eŭropo), kaj Esperanto involviĝis en la fakan laboron. UEA estis akceptita aligita membro de ALTE (vidu: <http://www.alte.org/>) kaj ricevis inviton prezenti sin dum la fakkonferenco en Lisbono, Portugalio inter 11-14 de novembro.

En la Cambridge-a konferenco Zsófia Kóródy sukcese prezentis UEA-n. Ŝi partoprenis ne nur en la laborgrupoj de ALTE (ĉefe en tiuj okupiĝantaj pri normigo de testoj por junaj lernantoj kaj pri instruista trejnado), sed ŝi kunlaboris ankaŭ en la paralela organizita konferenco EAQUALS. EAQUALS estas organizaĵo por kvalifiki lingvolernejojn kaj instru-kapabligajn kursojn, organizaĵo, kiu ellaboris kaj administras sistemon por garanti la altan nivelon de instruado.

Paralele kun tiuj eventoj la Hungara Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK, membro de ALTE de 1999) kune kun esperantista teamo, reprezentante UEA-n adaptis sian jam funkciantan kaj akreditigitan dulingvan Esperanto-hungaran kaj unulingvan hungaran ekzamen-sistemojn je unulingva Esperanto-ekzamensistemo, kies akreditigo en hungara ŝtata nivelo okazas nun en decembro de 2008.

Rezulte de la akreditigo ekde januaro 2009 eblas trapasi internaciajn Esperanto-ekzamenojn en 3 niveloj (B1, B2, C1) kaj mezuriĝi pri la bazaj 4 kapabloj: lega kaj aŭda komprenoj, skriba kaj parola sinesprimoj.

Detelaj informoj pri la membreco de UEA ĉe ALTE kaj pri la nova ekzamensistemo aperos baldaŭ en paĝaro de <http://edukado.net> kaj en la sekva numero de la revuo Esperanto.

La budapeŝta ekzamen-centro kunlabore kun edukado.net baldaŭ lanĉos specialan retan prov-ekzamenejon por ke testante siajn konojn la kandidatoj sciu precize sian nivelon kaj laŭ tiuj konoj povu pli efike pretiĝi kaj aliĝi al la novtipaj internaciaj ekzamenoj.

Alvoko al lingvolernantoj, parolantoj: Estas konsilinde amase ekzameniĝi laŭ tiuj novaj modeloj por fiere pruvi la egalvaloron de Esperanto. Ekzamenoj laŭ la novaj normoj povas regule okazi ĉefe dum grandaj internaciaj renkontiĝoj.

Novtipa UEA-ekzameno premieris

Post kelkjara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), kaj ofertas egalrangan mezuradon de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en la niveloj B1, B2 kaj C1.

Partoprenantoj de la Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon. Sume 8 personoj el 6 landoj

uzis la eblecon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon, bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la ĉiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo kontraktita kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, Hungario, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelajn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La surlokajn buŝajn ekzamenojn en Düsseldorf gvidis Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy, ambaŭ trejnitaj ekzamenantoj laŭ la KER-postuloj.

UEA kore gratulas al la unuaj ekzamenitoj, kiuj bonege sukcesis en la buŝa parto. Estas ĝojige, ke tiom multaj ekzameniĝantoj anoncis sin malgraŭ la jarfina festo kaj la mallonga tempo, kiu restis post la fina decido okazigi la ekzamenojn ankoraŭ en 2008.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum la Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 aprilo; dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en majo; kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando) en julio.

Pli detalaj informoj pri la ekzamenoj troviĝas ĉe:

<http://www.edukado.net/pagina/novaj+uea-ekzamenoj/22422/>

Nova elpaŝo de UEA ĉe UN

Reprezentantoj de UEA aktive partorpenis la Forumon de Unuiĝintaj Nacioj pri la demandoj rilate al malplimulto en Ĝenevo la 15-an kaj 16-an de decembro. La du reprezentantoj, Stefano Keller kaj Cesco Reale, ricevis la okazon alparoli la Forumon dufoje. Dum sia elpaŝo Stefano Keller prezentis ree la starpunkton de UEA pri lingvaj homaj rajtoj, kiun oni povas legi en <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eo/lingvaj-rajtoj.html>, kun aparta atento al la lingvoj en la instruado.

Cesco Reale parolis pri Esperanto kiel defendilo de lingvaj rajtoj. Li klarigis ke Esperanto estas justa solvo kaj facile lernebla. Krome, ”pro ĝia simpla kaj regula gramatiko, ĝia lernado helpas la regadon de aliaj fremdaj lingvoj, kaj [...] ĝi estas aparte taŭga por la bazlernejaj lernantoj, al kiuj ĝi donas lingvan bazon sen minacilian gepatran lingvon.”

En la fino de la kunveno UEA prezentis proponojn pri amendoj al ”Rekomendoj pri malplimulto kaj pri la rajto je edukado”, ankoraŭfoje insistante pri la neceso protekti la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj kaj specife pri la rajto de infanoj lerni pere de sia gepatra lingvo.

[el gazetaraj komunikoj de UEA]

Esperantourboj



La germana urbo Herzberg am Herz daŭre konkuras kun la pola Białystok por meriti la titolon "Esperanto-urbo". Antaŭ nelonge estis aldonita Esperanta teksto al du bonvenigaj tabuloj de la vilaĝo Sieber, kiu situas en la municipo de Herzberg. Sur ambaŭ dorsflankoj troviĝas grandlitera "ĝis revido". "Venu kaj spertu mem. Serioza subtenado ĉiam estas bezonata", instigas la loka teamo konsistanta el Peter Zilvar, Harald Mantz, Harald Schicke kaj Zsafia Korody.

La 15-an de decembro en 2008 okazis inaŭguro de 3 novaj informtabuloj ĉe la kajoj de la stacidomo en Herzberg, kun la vortoj: "...die Esperanto-stadt ...la Esperanto-urbo" – kompletigantaj la tabulon kun la urbonomo. Sur la foto la aldona tabulo estas metita iom tro alte, sed tio estis korektita intertempe.



"Esperanto" estas bela nomo, kaj kelkfoje vendejo nomas sin tiel nur pro tio. Sed en Białystok troviĝas kafejo kiu ne nur portas la nomon, sed ankaŭ akceptas mendojn en Esperanto – ekzemple de la speciala kuko "Esperantka" kun verda stelo! La kafejo havas propran retpaĝon:

<http://www.esperanto-cafe.pl/home.eo>.

La 14-an de decembro en 2008, okaze de la ŝanĝo de la fervoja horaro, ĉe la kajoj de la stacidomo en Białystok okazis inaŭguro de grandformataj informtabuloj. Ili estas faritaj dulingve: la informoj kaj la priskribo de simboloj de la fervoja horaro estas legeblaj en la pola kaj en Esperanto. Jen unu plia klopodo de la urbo por bonvenigi la Zamenhof-jubilean Universalan Kongreson de Esperanto ĉi-somere.

Por verkemuloj

Eldona Societo Esperanto eldonos antologian novelaron kun noveloj verkitaj originale en Esperanto en la jaroj 2000-2009. Ni invitas ĉiujn verkistojn kaj verkemulojn sendi novelojn retpoŝte al esperanto@globalnet.net. Limdato: 1-a de aprilo 2009.

Ni preferos aperigi novelojn, kiuj ankoraŭ ne aperis libroforme. Se ili aperis en revuo, tio ne estas problemo.

Via(j) kontribuo(j) estos bonvena(j).

Leif Nordenstorm (prezidanto de Eldona Societo Esperanto)

Sten Johansson (kunredaktanto de la novelaro)

[esper-inform]

Por instruemuloj

La *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* (ILEI) estas la unua Esperanto-organizo, kiu jam konferencis en ĉiuj kontinentoj de la mondo! Post la sukcesaj konferencoj en Azio (2007) kaj Afriko (2008) senlaca ILEI daŭrigas sian laboron kaj denove invitas vin al sia sekva konferenco en 2009 – ĉi-foje en Europo (por 2010 jam plananta konferenci en Ameriko).

En 2009 ILEI festas sian **60-jariĝon**, kiu koincidas kun la 60-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la 150-a naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof. La 42-a ILEI-konferenco okazos en Krakovo (Pollando), 17-25an de julio, 2009 – tuj antaŭ UK. La temo estos "La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado".

En la retpaĝo de ILEI ĉe <http://www.ilei.info> oni trovas Varbilon por la konferenco, la Unuan Informilon, retan aliĝilon kaj ankaŭ informojn pri aliaj konferencoj.


[landa agado]

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto
Sinzyku-ku, Waseda-mati 12-3
Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondopeton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profession, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

KULTURA ESPERANTO



FESTIVALO

7/7-12/7 2009

Helsingør - Danio

www.kef.saluton.dk